*********************************************************************************

INSTRU-CIRKULERO 2022/01 (majo 2022)

Neregula informilo pri E-instruado, novaĵoj, projektoj, renkontiĝoj

*********************************************************************************

Per tiu ĉi informilo ni peras interesaĵojn pri instruado, pri eventoj rilate al kursoj, klerigado kaj alvokojn, novaĵojn.

Karaj Gekolegoj,

dum la pandemiaj jaroj 2020-21 mi provadis dissendi porokazajn retmesaĝojn, ke nia membraro restu informita pri en- kaj eksterlandaj novaĵoj, informoj pri instruado de Esperanto. Bedaŭrinde niaj kutimaj jarĉefkunvenoj ne povis okazi en ĉeesta formo, tamen la t.n. hibrida solvo ebligis la partoprenon ankaŭ al tiuj, kiuj ne povis fizike ĉeesti nian kunvenon dum la aŭtuna jarĉefkunveno de Germana Esperanto-Asocio.

Bonŝance, en 2022 ni povos denove kunesti kaj organizi nian jarĉefkunvenon dum la tradicia, dumpentekosta Germana Esperanto-Kongreso: https://www.esperanto.de/de/dek2022

Per tiu ĉi letero mi invitas vin al nia jarĉefkunveno kaj esperas je via partopreno. Se vi havas rekomendojn, aldonendaĵoj al la tagordo, bv. sendi ĝin al mia retadreso: zsofia.korody@esperanto.de

## AGEI-jarĉefkunveno, Germana Esperanto-Kongreso

**Einladung: VDEL-AGEI Mitgliederversammlung**
Der Verband Deutscher Esperanto-Lehrer (VDEL-AGEI) lädt zu seiner jährlichen Mitgliederversammlung im Rahmen des 99. Deutschen Esperanto-Kongresses* (03.-06.06.2022) in Oldenburg ein. (Hauptthema: Nachhaltigkeit.) Link: https://www.esperanto.de/de/enhavo/willkommen

**Diese findet am Sonntag, 16-17h, den 05. Juni 2022 in dem DJH Jugendherberge Oldenburg**

**Adresse:** Straßburger Str. 6, 26123 Oldenburg

LKK: Telefon 49-421-6979958, Fax: +49-421-678696, Email: GEK@esperanto.de

Beginn ist um **16:00 Uhr**.
Neben Berichten über die Arbeit des vergangenen Jahres sind Diskussionen über die weitere Arbeit des Verbandes zu erwarten und ausdrücklich erwünscht. Der Vorstand erwartet daher eine rege Teilnahme der Mitglieder.

**Invito al: Jarĉefkunveno de AGEI**
La Asocio de Germanaj Esperanto-Instruistoj (AGEI) invitas ĉiujn siajn membrojn al la ĉi-jara ĉefkunsido, okazonta enkadre de 99a Germana Esperanto-Kongreso (ĉeftemo: Daŭripovo) inter 03.-06.06.2022. https://www.esperanto.de/eo/enhavo/bonvenon-0
Al AGEI ne alvenis kandidatiĝo por la estraro, la ĝisnunaj estraranoj pretas daŭrigi siajn taskojn en la Asocio.

**La AGEI-kunveno komenciĝos je 16:00 la 05-an de junio 2022 en la DJH Jugendherberge Oldenburg.**
**Adreso: Straßburger Str. 6, 26123 Oldenburg**
LKK: Telefon 49-421-6979958, Fax: +49-421-678696, Retadreso: GEK@esperanto.de

Proponata tagordo:
1. elekto de la gvidanto de la kunsido. Salutado, malfermo. Elekto de protokolanto, kontrolo de laŭstatuta invito kaj decidpovo
2. decido pri la tagordo
3. raportoj de la kasisto kaj la kasrevizoroj
4. raporto de la estraro. Malŝarĝigo de la estraro

5. elekto de estraro
6. informado, diskutado pri edukrilataj projektoj
7. pluaj aktivecoj kaj proponoj
8. laborplano por la sekva agadjaro. Decido pri loko kaj dato de la sekva jarĉefkunveno.
9. diversaĵoj

Koran bonvenon!

Kun multaj salutoj kaj danko al ĉiuj, kiuj per membreco kaj agado subtenas nian asocion,

Zsófia Kóródy
AGEI-Vorsitzende
AGEI-prezidanto

Instruado de Esperanto estas grava tasko por la disvastigado de nia lingvo. Do, ni invitas ĉiujn interesiĝantojn al la kunveno de AGEI por konatiĝi kun la gvidantoj kaj gekolegoj, por interŝanĝi spertojn, por pridiskuti intstrumetodojn, tradiciajn kaj modernajn lerneblojn, ofertojn al diversaj celgrupoj kaj priparoli planojn por la sekvaj jaroj.